



LA FERVOJISTO

OFICIALA ORGANO DE
INTERNACIA ASOCIO DE LA ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ.
MONATA FAKREVUO PRI FERVOJO.

Redaktoro: ILIJA F. PUHALO, fervojoficisto, Strojarska cesta, ZAGREB, Jugoslavujo.

TRI JAROJN

ni batalis por atingi regulan eldonadon de nia revuo. Tri longajn jarojn niaj plej seriozaj anoj kune kun la estraro serĉis rimedojn por atingi nian komunan celon. Plenaj tri jaroj pasis en batalo kaj finfine venis la dezirita jaro, kiam ni kun plej granda espero atendas regulan aperadon de la revuo. * Multaj dum tiuj tri jaroj forkuris de batalkampo kun malkonfido je fina venko. Multaj grumblis, multaj eĉ protestis, sed malmultaj serioze klopodis helpi. * Kelkaj postulis revuon ampleksan kiel la revuoj nacilingvaj, kaj forgesis, ke nacilingvaj revuoj havas milojn da abonantoj. Kelkaj postulis la revuon sen preseraroj aŭ kun malpli da preseraroj ol en nacia lingvo. Altaj volis havi en la revuo plej varian materialon, amuzan, fakan, socian ktp. Kaj kiom da altaj deziroj estis! * Sed ĝuste tiuj, kiuj plej multe postulis, nenion faris por la revuo. Tiuj, kiuj volis ampleksan revuon, eĉ unu novan anon ne varbis por nia asocio! Tiuj, kiuj volis seneraran revuon, sendis artikolojn kun tiom da eraroj, ke ili post korektado estis pli ruĝaj ol nigraj. Tiuj, kiuj volis havi varian materialon, eĉ unu artikoleton ne verkis. Jes, karaj samideanoj, tiaj estas la homoj! * Mi devas konstati, ke malmultaj estis, kiuj serioze zorgis por la revuo. Sed ĝuste-dank' al tiuj malmultaj — ni nun povos regule eldonadi la revuon. * Jen opinio de unu el la plej fervoraj kunlaborantoj, de sro Carl Viksten, oficisto de svedaj ŝtataj fervojoj, kies artikolo aperis kaj aperos en la revuo: „Se mi havus rajton, mi eble menciis, ke la koloro de kovrilo kaj de la papero ĉe la gazeto, ŝajnas esti plej bela ĉe la numero 1—2 de la jaro IV. Tamen tio estas eble mona afero. Aliparte la gazeto estas bonega“. * Kaj jen la opinio de sro Eriksson, nia sveda asesoro: „Mi nur volas noti, ke mi atendas informojn pri la ekonomia stato de la asocio. Estas mia decido, ke la manko de financaj rimedoj ne malhelpu nin ĉi tiun jaron eldoni nian revuon. Poste oni denove pritraktos la aferon“. * Se oni konsideras la fakton, ke sro Eriksson oferis multege da mono por nia asocio (vidu la jarraporton de kasisto) oni komprenas, ke lia diro ne estas ordinara babilajo, sed firma decido de komprenema kaj helpema samideano, kiu scias taksu la valoron de nia revuo kaj de nia asocio. * Tiajn leterojn ni malofte ricevas kaj se ili venus de pluraj samideanoj, nia asocio eldonadus la revuon, kiu povus konkuri al naciaj fakaj revuoj. * Jen tio donas al ni la certecon, ke ni dum kvara jaro de nia laboro por la asocio, povos eldonadi regule monate aperantan 8-paĝan revuon presitan modele en unu el la plej bonaj nialandaj presejoj. * Kiajn artikolojn la revuo enhavos, dependas de la kunlaboraĵoj, kiujn ni ricevos. Niaflanke ni klopodos fari ĉion eblan por pliinteresiĝi ĝin. * Fine mi volas ankoraŭ menci, ke dum plenaj 3 jaroj ni eldonadis nian revuon kaj ĝi atingis, kun malgranda helpo de malmultnobra anaro, la amplekson de entute 152 paĝoj sen kovrilo kaj kun la kovrilo 184 paĝojn. Tio estas sendube pozitiva sukceso de nia laboro kaj de la laboro de malmultaj seriozaj helpemaj samideanoj. Ni dankas al tiuj, kiuj komprenas, ke la laboro farita estas, kompare al la rimedoj kiuj staris je nia dispono, grandega. * Mi ripetas ĉi tie elĉerpaĵon el la gvidartikolo de nia prezidanto sro Stojnić, kiu en la unua numero de la revuo en la jaro 1924 skribis: „Sed por regula eldonado kaj kostanta plibonigado de nia fakrevuo estas absolute necesa sincera helpado de ĉiuj niaj gemembroj“. * Estu tiuj vortoj gravurita en via rememoro, karaj gekolegoj en la tuta mondo, kaj mi esperas, ke nia asocio ekmarŝos — se vi direktos vian laboron laŭ tiuj vortoj — pli sukcesan epokon ol ĝi marŝis ĝis nun, kun malgranda helpo de kelkaj samideanoj. * Nur tio estas mia sincera deziro!

ILIJA F. PUHALO.

A. Scheidegger,

direktoro de Westinghouse-Societo-Bern (Svislando)

GEORGE WESTINGHOUSE.

(Skizo pri lia vivo kaj laboro).

La inventinto de fervojo al militis al la homaro grandan venkon kontraŭ tempo kaj spaco, sed la venkon oni ne povis tuj plene utiligi, ĉar mankis brido sur ŝtala vaporĉevalo, forestis la ebleco laŭbezone haltigi la lasitan movigpovon. La ĉevalon oni devis devigi, ke ĝi estu obeema, antaŭ ol oni povis ĝin utiligi. Nia plej nova transportilo — aeroplano — restos tiel longe neperfekta, ĝis ni plene povos komandi al ĝi. Ni ja povas flugi, sed ni ne povas laŭ plaĉo kaj bezono halti.

La evoluo de la aeroplano estas proksimume tie, kie estis la evoluo de la fervojo, antaŭ ol George Westinghouse trovis ĝustan bremsadon. Por ke la lokomotivo povu plenforte veturi devis esti eltrovita rapide kaj certe funkcianta bremsilo. Tio signifis fakte estri la vaporpovon kaj tiun rimedon donis al ni George Westinghouse. Li instruis nin per sia bremsilo haltigi la trajnon en plej granda rapideco kaj plej mallonga tempo aŭ laŭplaĉe ĝin malplirapidigi. Li estis la unua, kiu ebligis rapidan trafikon.

En vilaĝeto Central Bridge apud Novjorko naskiĝis George Westinghouse la 6-an de Oktobro 1846.

Lia patro, kamparano, eltrovis draŝmaŝinon je kies preparado kaj vendado li dediĉis sian tutan tempon. En patra laborejo, pli ol en la lernejo, ricevis George Westinghouse la unuan edukon. La lernejo estis al li indiferenta, prefere li dediĉis sin al siaj revoj kaj planoj, sed pli ol ĉio ĝojigis lin la restado en patra laborejo, kie li povis elprovadi kaj laboradi. La patro per ĉiuj fortoj klopodis fari el la filo bonan lernanton kaj por atingi tion li malpermesis al la filo eniron en la laborejon dum lerneja tempo. Sed la junulo posedis fortan volon, kiun eĉ la plej akraj vergoj de la patro ne povis regi. Kiam io lin interesis, li forgesis la patron kaj lernejon, ĝis li sukcesis pri la objekto de sia intereso ricevi klaran opinion. Inventistajn ideojn li jam posedis de sia junaĝo, kaj estinte 15 jara li eltrovis rotacian maŝinon, kiu estus devinta doni al la ŝipoj pli fortan movon ol tion donis la padeloj. Kelkajn jarojn poste Westinghouse turnis sian atenton al la problemoj, kies solvojn la fervojo atendis kaj konstruis unue anstataŭigajn relojn, kiuj eĉ elreliĝoj de la trajnoj montriĝis taŭgaj kaj poste eltrovis pli bonan sistemon de relkruciĝaj pecoj, kiuj ankaŭ estis pli longdaŭraj ol la antaŭaj.

La ĝisvivo de unu fervoja katastrofo instigis junan, inventeman spiriton al la solvo de unu problemo, kiu glorigis lian nomon. Sur rekta, libera fervojlinio, dum tute hela tago, kunpuŝiĝis du ŝarĝtrajnoj. La lokomotivestroj bone vidis la danĝeron kaj ili agis laŭ sia povo sed ne povis haltigi la trajnojn en unu minuto, oni diris al li.

Tio ĉi estis la granda problemo. Ĉiu rapida veturado estis tiel longe vivdanĝera por vojaĝantoj kaj fervojistoj kiel ankaŭ por la strata trafiko, ĝis oni ne eltrovos efikan, rapide funkciantan bremsistemon. Tiutempa primitiva bremsistemo eĉ ne plene sufiĉis haltigi la trajnon en la stacioj, kaj ne pli

haltigi la trajnon okaze de danĝero. 800 metrojn antaŭ la stacio devis la lokomotivestro doni signalon, por bremsado. Kiam la bremsistoj aŭdis la signalon, ili devis kiel eble plej rapide sur ĉiu vagono bremsi. Se tio estis rapide farite, tiam la trajno haltis antaŭ, en aŭ eĉ preter la stacio. Tiun danĝeron kaj nesufiĉan sekurecon oni devis forigi.

Westinghouse tuj komprenis la neceson, eltrovi bremsistemon, kiu samtempe funkcios en la tuta trajno kaj kiu laŭeble povos esti ekfunkciigata egale el iu ajn vagono aŭ el lokomotivo. La homa forto por tia bremsistemo ne povis esti konsiderata. Westinghouse unue pensis pri la vaporo disponebla el la lokomotivo. Per unu trairanta tubkondukilo devus esti premataj sur ĉiun radon de la vagonoj ĉiuj bremsblokoj kaŭze de vaporforto de la lokomotivo.

Siajn unuajn provojn faris tiutempe 21 jara inventisto en Pittsburgh, kie li ankaŭ baldaŭ trovis financan helpon. Unue oni konstatis la malsukceson, ĉar la vaporo kondensiĝis en la tubkondukiloj kaj tiel ĝi perdis sian preforton. Sed Westinghouse ne perdis la kredon en la ĝustecon de ĉefa ideo de sia bremsistemo t. e. samtempa bremsfiko sur ĉiujn vagonojn.

Foje li legis en iu ĵurnalo pri bormaŝinoj uzataj ĉe konstruo de tunelo Mont Cenis, kiuj estis funkciigataj per premita aero. La sciigo donis al li novan ideon. Se premita aero povas puŝi la bormaŝinon en malmolan ŝtonon, ĝi devas ankaŭ bremsi vagonradojn. La vaporo de la lokomotivo povis esti facile uzbla por produktado de la premita aero. Westinghouse tuj komencis adapti sian eltrovaĵon por funkciigo per premita aero. La 13-an de aprilo 1869 li jam povis postuli unuan patenton je premaeraj bremsiloj. La inventaĵo, kiu ŝparis multajn homajn vivojn, sukcesis.

Jam la unua provo per nova bremsilo estis brila sukceso. La Panhandle-fervojo disponigis unu lokomotivon kaj 4 personvagonojn. Hazarde okazis, ke okaze de provveturado eĉ ne plenajn 100 metrojn antaŭ la trajno aperis unu veturilo. La nova bremsilo estis ekfunkciigata kaj rapide veturanta trajno haltis en sufiĉe granda malproksimeco de la veturilo. La vojaĝantoj estis forte ekskuitaj, sed la bremsilo pruvis sian brilan funkciadon.

Kelkajn semajnojn poste estis fondita «Westinghouse Premaerbremsa - Asocio», kiu tre baldaŭ estis superŝutita per mendoj. Sed Westinghouse volis enkonduki sian inventaĵon ankaŭ en Anglujo kaj sur kontinento. Li vojaĝis al Londono, sed tie lin atendis nekredemo kaj malkonfido. Ĉiuj malfacilaĵoj estis starigitaj kontraŭ juna amerika «fantaziulo». Li eĉ volis je sia propra kosto pruvi al nekredemuloj, ke la trajno povas esti tre bone bremsata per aero, sed li devis multege penadi por ricevi permeson ekipi la trajnon per sia bremsilo. Komprenoble ke la aprobo ne devis esti longe atendata. La unua Westinghouse-bremsilo estis enkondukita en Anglujo en la jaro 1875; ĝi rapide disvastiĝis en nova kaj malnova mondo, kaj George Westinghouse povis poste kun kontento rakonti pri tio, kiel lin la anglo Vanderbilt kune kun la inventaĵo elpelis el la domo konsiderante lin frenezulo, aŭ kiel anglaj fervojaj kompanioj unu post alia rifuzis disponigi al li siajn relarojn por ke li povu montri la inventaĵon.

(Daŭrigota.)

TRI INTERNACIAJ TAGOJ EN STOCKHOLM.

El »Signalen«, sveda ferv. gazeto.

La Internacia Federacio de Societoj de la Abstinantaj Fervojistoj havis sian dujaran kongreson en Stockholm dum la tagoj de la 30-a de junio ĝis la 2-a de julio ĉi-jaro. La kongreso ankaŭ estis la 20-jara jubileo de la federacio, ĉar ĝi estas fondita en Stockholm en la jaro 1907. Ĉeestis pli ol 200 personoj de dekumaj landoj en Eŭropo, do, malgraŭ ke la kongreso kunsidis en lando kaj urbo tre malproksima de la centro de Eŭropo, ĉi-kongreso estis unu el la plej multnombre vizitataj kongresoj, kiujn la federacio ĝis nun havis.

La kongreso estis vere internacia. Ni notu la kongresintojn laŭ landoj, por pruvi tiujn dirojn: Aŭstrio 1, Ĉeĥoslovakio 3, Danujo 60, Finnlando 5, Francujo 36, Germanujo 7, Nederlando 3, Norvegujo 58, Polujo 8, Svedujo 20-30, kaj Svislando 14. La ĉefa lingvo uzita estis la germana, sed ĉiuj paroladoj estis tradukitaj al franca kaj al sveda aŭ dana lingvoj, do ordinare du tradukoj po ĉiu parolado. Eĉ Esperanto estis aŭdita, bone parolita de dano, S-ro Palsberg, kaj la parolado estis poste tradukita sveden de la subskribinto, kaj plue tradukita ankaŭ al germana kaj franca lingvoj. Kiel estas vidata la multlingveco estis vere sufiĉa.

Malgraŭ la peza ŝarĝo de la multlingveco, la kongresa laboro bone progresis. La prezidanto de la federacio, S-ro Direktoro Karl Weber el Zürich, mem parolis germanan kaj francan lingvojn, eĉ tradukinte al tiuj lingvoj reciproke, kaj tio multe plifaciligis la kongresan laboron. Krome iu juna fraŭlino Stöver el Oldenburg, bone tradukis la svedlingvajn paroladojn al germana lingvo kaj reen, kaj la federacia vicprezidanto, S-ro Kontroloro Parup al Aarhus, kunhelpis en traduko de germana lingvo al la dana, aŭ de iu el la skandinavaj lingvoj al la germana lingvo. Do la kongreso estis simila al aliaj internaciaj kongresoj, en kiuj ne nur la sola internacia lingvo, nome Esperanto, estas parolata.

Sed ĉu la esperantistoj forestis? Ne entute. Ĉeestis la asessoroj de Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj de la nordaj landoj, Danujo kaj Svedujo. Verŝajne tre malmultaj. Sed tiu guto el la granda esperantista maro agis laŭ povo. Ili agitis por internacia lingvo, ĉar internacia organizo nepre bezonas internacian lingvon. Kaj vere. Ŝajnis ke la okuloj de la nekomprenuloj malfermiĝis, ŝajnis ke la kongresintoj komprenis ke posedo de internacia lingvo estas bezonaĵo, jes vera trezoro por ĉiuj homoj vizitantaj fremdajn landojn.

Kun granda mirego la nordaj esperantistoj poste trovis inter la Svislanda delegitaro du kolegojn sufiĉe bone komprenantajn nian lingvon, kvankam ili ne estis spertuloj en ĝia parolado. Sento de feliĉo! Oni ja povis senpere paroli kun ili, kaj vere la interkompreniĝo estis bona kaj reciproka. Jen nova triumfo de la lingvo nia.

En la tagordo de la kongreso estis punkto pri internacia lingvo, ke ĝi devas esti uzota en la rilatoj, skribaj aŭ buŝaj, ĉe la federacio, jes eĉ ĉe la kongresoj. La proponinto de tiu punkto ĉe la lasta kunsido federacia, nia fervora finnlanda samideano, S-ro Staciestro Salokannel el Salmínen, nune ne ĉeestis.

Sed estis devo por la ĉeestintaj esperantistoj paroli por nia lingvo, jes eĉ, se necese, defendi la proponon faritan. Estis tiam — kredeble la unuan fojon — en kiu esperantaj vortoj sonis en la kongresejo. Ĉiuj kongresanoj streĉe aŭskultis.

Dum la debato posta kelkiuj el la kongresanoj opiniis, ke oni ja ne povas postuli de la estraranoj, ke ili lernu la lingvon Esperanton. Sed iu el la estraranoj mem deklaris ke estas memkompreneble ke, se la anoj de la federacio sufiĉe multnombre kaj ofte en rilatoj federaciaj, kun la estraro uzos Esperanton, ankaŭ la estraranoj lernos tiun lingvon. Kaj la kongreso decidis ke Esperanto estos permesata lingvo en rilatoj interne de la federacio.

Oni ja povas deziri ke la anoj lernu Esperanton, kaj ke ili ĝin uzu en federaciaj rilatoj ĉiam kaj multe. Venonta kongreso de la federacio okazos en Warszawa la jaro 1929. Estas devo de niaj Pollandaj esperantistoj sin ĝis tiam prepari, por ke nia lingvo estos, se ne la sola lingvo kongresa — tion oni ja ne povas esperi — sed la ĉefa lingvo dum la kongreso. Nun ne ĉeestis esperantisto inter la Pollanda delegitaro.

Malgraŭ multe da laboro, la kongresaj tagoj estis tre ĉarmaj. La kongresanoj ĝuis multege da favoroj de la registaro, de la ŝtatfervoja administracio, de privataj fervoj-administracioj, kaj de la fakorganizo de svedaj fervojistoj »Sveda Fervojista Asocio«. La belega vespero ĉe Saltsjöbaden estis vera sonĝo. Certe la kongresaj tagoj longtempe restos en la memoro de ĉiuj ĉeestintoj.

Persone mi dankas al ĉiuj por la kunestado. Kaj ĝis revido!

Ernst Eriksson — Stockholm, Svedujo.

D I V E R S A J O J

GVIDLIBRETO POR JAPANLANDO.

Okaze de XIX. U. K. mi konatiĝis kun japana samideano, mekanika inĝeniero kaj ĉefo de konstruo de vagonoj ĉe japanaj ŝtatfervojoj s-ro Kenji Ossaka el Tokio.

Interparolante kun li, mi rememorigis pri iu japana revuo, en kiu mi legis pri japana fervoja inĝeniero, esperantisto, kiu forveturis el Japanujo al Usono kaj Eŭropo, por studi konstruadon de fervojaj vagonoj. Tintempe mi eĉ pensi ne povis, ke mi konatiĝos iam kun tiu samideano. Hazarde jen, dum jubilea kongreso, ni renkontiĝis.

Dum interparolado en kiu mi klarigis al s-ro Ossaka necesecon de kunlaborado inter japanaj fervoj. esp. kaj nia asocio, li demandis min, ĉu mi konas la libron »Japanlando«, eldonitan oficiale de japana Ministerio de ŝtataj fervojoj en Tokio, en la jaro 1927. Je mia nea respondo s-ro Ossaka prenis solan ekzempleron de la libro, kiun li ĉe si havis kaj donacis ĝin al mi kun afabla rememor-dediĉo. Hazarde ĉeestis ankaŭ gvidantoj de esp. movado sroj: Dro Privat, R. Kreuz kaj A. Ĉe, al kiuj mi tuj montris la libron. Kompreneble, ke la libro »oficiale« eldonita en Esperanto de Ministerio de japanaj ŝtat-fervojoj kaŭzis grandan intereson. Same grandan intereson ĝi vekis ĉe aliaj fervoj. esp. kaj neesp. al kiuj mi ĝin poste montris.

Reveninte de la kongreso hejmen, atendis min sendaĵo, enhavanta plurajn ekzemplerojn de la libro,

sendita de japana Ministerio por eksterlandaj aferoj. Mia ĝojo estis kompreneble granda.

La libro postulas specialan atenton de ni fervojistoj esperantistoj, ne sole pro tio, ĉar ĝi estas el Japanujo, sed pro tio, ĉar ĝi estas — almenaŭ laŭ mia scio — la unua oficiala eldonaĵo de ŝtata fervoja ministerio. Mi tre bedaŭras, ke sur la titolpaĝo staras rimarko »Ĉiuj rajtoj rezervitaj«, ĉar mi prefere represus artikolojn el ĝi ol ĝin defale recenzus. Cetero tio ankaŭ ne estas eble pro manko de loko kaj pro granda nombro de diversaj, tre interesaj, artikoloj.

Mi klopodos en ĉi kelkaj linioj doni almenaŭ ioman priskribon de la bele ekipita libro.

La kovrilo mem jam montras eksterordinarecon por ni eŭropanoj, ĉar sur ĝi estas prezentita en plurkolora bildo japana virino en nacia kostumo. La libro enhavas 37 ilustraĵojn, 9 landkartojn. La tuta amplekso estas pli ol 100 paĝoj. La informoj ententitaj en ĝi utilos al vizitantoj esp. de tiu ĉarma lando, tre malmulte konata al ni eŭropanoj. La tradukon faris »Redakcio de Japana Esperanto — Instituto en Tokio«. Ĉiuj artikoloj estas skribitaj en bona esperanto kaj tre interesplenaj.

Anstataŭ paroli pluen, mi citos ĉi tie la enhavon de la libro kaj ĝi mem diros sufiĉe:

Japanlando (geografia priskribo, pejzaĝo, banko, budaismaj temploj, allogeco laŭ sezonoj, tempo por vizito, tabelo de temperaturo, belartaĵo).

Vaporŝipaj vojoj al Japanlando, Transsiberia vojaĝlinio, Diferenco de horo, horo por la fervojo, Hoteloj — Japana Asocio de Hoteloj, Japana Turista Buroo, Japanaj Ŝtat-fervojoj.

Informo por vizitantoj al Japanlando.

Vestaĵo, Pasporto, Ekzameno ĉe doganejo, Mono, Elspezo por vojaĝo kaj aliaj, Gvidisto, Veturpago de ĵinrikso kaj aŭtomobilo, Eksterlandaj Ambasadorejoj kaj konsulejoj, Poŝto kaj Telegramoj, Fotografio kaj skizado, Tabelo de pezo kaj mezuro, Amuzaĵoj, Sportoj, Butika aĉetado, Ĉefaj Produktaĵoj kaj Industrioj.

Poste sekvas listo de: Ĉefaj vizitadejoj kaj aliaj interesaj lokoj en Japanlando.

Krom tio:

Populara rondvojaĝo:

10-taga vojaĝo de Jokohama al Nikko kaj Ma-cuŝima,

15 taga vojaĝo de Tokio ĝis Kobe,

7 taga vojaĝo de Kobe al Nagasaki.

Informoj por vojaĝantoj per japanaj ŝtat-fervojoj.

Veturpagoj, biletoj ktp., Pakaĵoj de pasaĝeroj, Vagonaroj kaj Kupeoj.

Diversaj rimarkoj, Biletagentoj, Travojaĝa servo.

Fine troviĝas:

Listo del' linioj de Japanaj Ŝtat-Fervojoj.

Tabelo pri: Dua-klasa pasaĝerpagoj kaj

Landkarto de Japanlando.

Aldonu ankoraŭ la ilustraĵojn troviĝantajn en la libro kaj vi povos almenaŭ iomete prezenti al vi la valoron de la libro.

Mi varme gratulas kaj dankas al japana Ministerio pro ĝia komprenemo kaj favoro al Esperanto. Tute mi deziras, ke la libro, servu al la celo, kiun al ĝi donis Ministerio, t. e. al turisma propagando kaj konatigo de la lando.

La libro, kiun eldonis japana Ministerio povus esti imitinda ekzemplo por ĉiuj ŝtatoj en Eŭropo, kiuj sin taksas esti »pli kulturaj« kaj traktas nian lingvon kun iometa malkonfido. Jen al ili plej bona pruvo, ke Esperanto estas en aliaj landoj pli favorata kaj pli serioze komprenata.

Japanajn fervojistoj esp. mi ankaŭ ĉiokaze invitas aliĝi al nia asocio por ebligi progresigon de la lingvo, kiun ili kaj ilia Ministerio tiom alte taksas dume ceteraj staras flanke kaj rigardas apatie aŭ eĉ kontraŭbatalas ĝin.

I. F. P.

SPERTA PROPAGANDO.

Dum XIX. U. K. en Danzig mi kun plezuro akceptis la inviton de kolego Gustav Pietsch, partopreni lian prelegon en loka filio de Germana Fervojista Asocio en Danzig. Kune kun mi vizitis la prelegon ankaŭ sroj: Eriksson, Dahnè kaj Nilsson.

La prelego okazis en sindikata domo la 1-an de Aŭgusto je la 6-a horo. La temo de la prelego estis: »Esperanto kiel sindikata problemo«.

La estraro de la loka filio kunvokis la fervojistojn per specialaj germanlingvaj afiŝetoj, metinte kiel unuan punkton de la kunvena tagordo la prelegon de kol. Pietsch.

La prezidanto de la estraro sro Roggenbuck malfermis la kunvenon, kiun partoprenis granda nombro da fervojistoj, salutante kol. Pietsch kaj nin, kiuj partoprenis la prelegon, per kelkaj vortoj, instigante la fervojistojn serioze studi Esperanton, kies Kongreso en Danzig pravas, ke ĝi estas grava ilo por internacia kompreniĝo.

Post tio li petis srojn Eriksson kaj Puhalo diri al la ferv. kelkajn vortojn. La esperantlingvajn paroladetojn tuj tradukis en germanan lingvon kol. Pietsch. Ambaŭ parolintoj estis varme aplaŭditaj.

Kol. Pietsch post tio ekkomencis sian prelegon en germana lingvo. Mi estis tre kontenta aŭdi lian paroladon, kiun mi komprenis plene, ĉar li parolis klare. Tiun fojon mi vere estis agrable surprizita pri treege interesa, bone dokumentita kaj trafa prelego. Dum mia vivo mi jam aŭdis plurajn propagandajn prelegojn. Ili estis pli-malpli bonaj. Mi sincere konfesas, ke mi similan prelegon eĉ ne unu fojon aŭdis.

Ne estas al mi eble ĉi tie citi la tutan enhavon, sed estas mia arda deziro publikigi ĝin en nia revuo. Mi tuj petis kol. Pietsch ke li ĝin traduku en Esperanton kaj sendu al la redakcio, kiu ĝin certe publikigos. Mi estas plene konvinkita, ke ĝi trovas aprobon de ĉiuj legantoj kaj ke ili ĝin tre volonte uzus por propagando. Kol. Pietsch tion promesis kun ioma hezito dirante »eble mi ĝin tradukos«. Mi ripetis tie ĉi mian peton akeentante, ke estas necesege havi tiel bonan propagandilon por povi tutmonde propagandi. Estus vera domaĝo, se ĝi restus nekonita al aliaj anoj.

Post la prelego ni adiaŭis niajn germanajn kolegojn en la espero, ke ili baldaŭ estos novaj adeptoj de nia movado.

Uzante tiun ĉi okazon mi volas ankoraŭ menci i kaj danki danzigajn fervojistojn por ilia afabla gvidado tra la urbo, organizita de kol. Pietsch kaj Roggenbuck.

Mi proponas, ke ni estonte organizu en la urboj, kie ni havos niajn jarkunvenojn dum U. K., similajn prelegojn. Oni povus aranĝi viziton de diverslandaj fervojistoj al tia kunveno kaj paroligi ĉiun repre-

zentanton de unuopa nacio. La enlanda fervojisto esperantisto tradukus paroladojn en nacian lingvon kaj post tio farus mem prelegon pri Esperanto. La temo estas tre grava kaj mi pensas, ke estus bone ekokupi sin pri ĝia estonta apliko. Ĉiuj bonvolaj proponoj tiurilataj estu sendataj al nia revuo.

Pri la ceteraj aranĝoj de la kongreso, kiu ĝenerale bone sukcesis, mi ne volas min okupi, ĉar la aferoj estas jam konataj el aliaj esp. gazetoj. Mi pritraktis ekskluzive tion, kio certe interesos niajn anojn en ĉiu lando.

Tiu speciale interesa ĝisvivo restos daŭre en mia rememoro. De pove mi konvinkigis, ke ni ne ankoraŭ elĉerpis ĉiujn propagandmanierojn. I. F. P.

OFICIALA PARTO

PRI NIA JARKUNVENO DUM XIX. U. K. EN DANZIG.

Kiel estis sciigite en junia-julia nro de nia revuo, okazis dum XIX. U. K. nia jarkunveno. La estraron reprezentis la viceprezidanto sro Ilija F. Puhalo. La kunvenoj okazis en aparta ĉambro de Petro-lernejo; la unua la 29-an de Julio kaj la dua la 1-an de Aŭgusto 1927.


La jarkunvenon — kiel kutime — ne partoprenis multaj ano, sed la diskutoj tiun ĉi fojon estis tre interesaj kaj plenaj da seriozeco. Partoprenis la

prenis sroj Ernst Eriksson kaj Oscar Dahrné. La ĉefa temo de la diskutoj estis regula aperado de la revuo. Unuanime oni konstatis la bezonon, ke la revuo regule aperadu. Speciale serioze estis pridiskutata la financa flanko, kiu — kiel konate — estas plej grava malhelpo por regula aperado de la revuo.

Kiel estas videble el la raportoj, por regula eldonado de la revuo estus necese aŭ varbi grandan nombron da ano, aŭ havigi iun alian monsubtenon.

Nia sveda asesoro sro Eriksson proponis, ke la estraro sin turnu al naciaj fakaj organizoj kun la peto por monsubteno. Li en sia parolado klarigis, ke sammaniere agas »La Interligilo de l' P. T. T.« en sia sfero, kaj pro tio ĝi povas regule aperadi. Tia stato daŭrus nur tiel longe, ĝis la anaro de L. A. E. F. kreskus tiom, ke ĝi per siaj kotizoj povus kovri ĉiujn elspezojn. Siaflanke promesis sro Eriksson entrepreni necesajn paŝojn ĉe sveda fervojista asocio kaj li esperas ricevi subtenon same kiel en pasinta jaro. Sro Dahrné promesis entrepreni similan paŝon ĉe la sveda lokomotivista asocio.

Diveninte el la raportoj, ke la redaktoro, kiu krom tio okupas ankaŭ viceprezidantan postenon en la asocio, estas tre okupita per korespondado inter la ano, kaj restas al li tre malmulte da tempo por redakti la gazeton, oni pridiskutis, ĉu estus eble trovi por li anstataŭanton por viceprezidanta posteno por tiel liberigi lin de la laboro kaj doni il li la eblecon dediĉi siajn fortojn nur ekskluzive al redaktado.



Supra vico: de maldekstre A. Bissetti (Torino); G. Nilsson, Västeras; Ed. Herrmann, (Königsberg); J. Tichawski, (Katowice); D. Friedländer, (Zagreb); H. Chocholkova, (Praha); Malsupre: Ed. Hiebsch, (Bodenbach); E. Erikson, (Stockholm); I. Puhalo, (Zagreb); G. Pietsch, (Berlin); O. Dahrné, (Västeras).

jarkunvenon sekvantaj ano: Ernst Eriksson el Stockholm, nia sveda asesoro, Oscar Dahrné kaj Gustaf Nilsson el Västeras (Svedujo); Gustav Pietsch, sekret. de germ. esp. ferv. asocio el Berlin kaj Ed. Herrman el Königsberg (Germanujo); Dragutin Friedländer, ferv. ing. el Zagreb (Jugoslavujo); Aleviano Bissetti el Torino (Italujo); Johano Tichawski el Katowice (Polujo). Krome partoprenis kiel gastoj: fraŭlino Hedva Chocholkova el Praha kaj Ed. Hiebsch el Bodenbach (Ĉeĥoslovakujo).

Dum la unua kunsido estis tralegitaj la raportoj de la estraro kaj post tio okazis diskuto, kiun parto-


La viceprezidanto klarigis detale, ke tia dispartigo nuntempe tre malutilus al la movado, ĉar ne ankoraŭ estas finitaj ĉiuj organiza laboroj kaj trovi la anstataŭanton en la nuna tempo estus tre malfacile. Por tia posteno oni bezonas homon, kiu scipovus ankaŭ estonte direkti la asocion celkonforme kaj vigle sin okupi pri la progresigo. Laŭ la klarigo de la viceprezidanto kaj en la senco de la statutoj devus la korespondadon kun la ano en sia lando prizorgi la asesoroj mem kaj nur pri gravaj aferoj raportu al la estraro. Kiel modelon en tiu ĉi rilato li citis la germanan kaj svisan asocion de esp.

ferv. Parte faras tiel ankaŭ la sveda asesoro sro Eriksson kaj li promesis post tiu klarigo plene sin okupi pri tia aranĝo. Cetere la estraro tion detale klarigis en la cirkulero nro XII. d. d. 29. IV. 1926. Do, se la afero estus aranĝita simile en ĉiuj landoj, defalus granda laboro de la estraro, kaj speciale de vicprezidanto, kiu tiam povus plene dediĉi sin al redaktado.

El la raporto estis videble, ke en kelkaj landoj la asesoroj tute ne taŭgas, kaj pro tio la jarkunveno rekomendis al la estraro, ŝanĝi en tiuj landoj la asesorojn. Ĉefe tio rilatas al la asesoroj, kiuj dum tuta jaro trege malbone aŭ neniel laboras. Kelkaj eĉ

Pola samideano-ferv. sro Tichawski raportis pri la sukceso kiun li atingis per artikolo pri Esperanto en por-fervojista kalendaro eldonata de ilia nacia asocio. La artikolo aperis du jarojn sinsekve kaj la intereso estis tre granda. Li rekomendas similan propagandon en aliaj landoj.

La vicprezidanto sciigis, ke 8 gazetoj aperigataj en 6 ŝtatoj en 6 lingvoj preskaŭ senescepte regule havas esp. rubrikon. La gazetoj aperas en lingvoj: sveda, serbo-kroata, germana, estonia, itala, franca. Krome Internacia Transportlaborista Federacio el Amsterdam propagandas E. per sia organo eldonata



De maldekstre: I. Puhulo, G. Nilsson, O. Dahné, Ing. Kenji Ossaka, Tokio, (Japanujo), E. Herrmann, E. Eriksson, G. Pietsch.

agis kontraŭ la intereso de la asocio per arbitra, seninterkonsenta laboro en sia lando.

Koncerne la kotizon estas decidite, ke ĝi restu la sama kiel dum pasinta jaro, ĉar ĝi ne estas troalta.

La dua kunveno estis speciale interesa, ĉar ĝi sin okupis ĉefe pri propagandmaniero.

En sia parolado la vicprezidanto prezentis al la ĉeestantoj la gravecon de Esp. por fervojistoj. La fervojistoj havas plej multe da okazo por propagandi dum la deĵoro mem. Same ili povas plej bone utiligi Esperanton. Li citis kelkajn ekzemplojn, inter kiuj la plej gravaj estas: propagando per portado de signoj sur uniformo, vojaĝado al eksterlando (facile efektivebla, ĉar ferv. ricevas senpagajn vojaĝbiletojn de eksterlandaj fervojoj), rekompensa restado ĉe alilandaj kolegoj, utilojn kiujn oni povus ĉerpi el legado de la revuo, ĉar en ĝi povus aperadi sciigoj pri salajroj, viv- kaj laborkondiĉoj de la diverslandaj ferv. ktp. Li invitis ĉiujn serioze eklabori inter la kolegoj por disvastigo de Esperanto kaj atentigis pri propagando per nacilingvaj fakaj revuoj.

Sveda asesoro sro Eriksson detale parolis pri la propagando per nacilingva fakrevuo »Signalen«, kiu afable disponigas en ĉiu numero tutan kolonon por informoj pri Esperanto kaj por Esperanto. Li akcentis, ke tiu laboro ne tuj estas fruktodona, sed ĝi certe alportos pli-malpli frue bonajn fruktojn.

en 4 lingvoj. Ĝi en ĉiu okazo rekomendas al siaj anoj lernadon de E. Krome raportas vicprezidanto pri la propagando per horarlibroj, kiel tion faras du sudslavaj eldonistoj en siaj libroj. Mondkonata vojaĝoficejo »Cook« eldonis en sia por-kontinenta horaro liston de ĉefaj frazoj en Esperanto.

Itala ano sro Aleviano Biseti parolis pri la okazigo de internaciaj kunvenoj en diverslandaj urboj kaj promesis, ke li provos kunvoki la unuan internacian kunvenon en Torino (Italujo). Dum tiaj kunvenoj, kiujn partoprenus la fervojistoj, oni povus diskuti diversajn aferojn, kiuj la fervojistojn speciale interesas.

Mallonge dirite la jarkunveno estis tre interesa kaj ĉiuj partoprenintoj kontente foriris al fotografisto, kie ili sin fotografis por havi rememoraĵon. La kliŝo, kiun ni reproduktas montras ĉiujn partoprenintojn.

Post fotografado invitis sro Pietsch la interesiĝantojn al sia prelego farita ĉe loka filio de Germana Fervojista Asocio. Pri ĝi ni raportas aliloke. Red.

VARBU NOVAJN ANOJN!

RAPORTO DE VICPREZIDANTO POR ĜENERALA JARKUNVENO DE I. A. E. F.

okaze de XIX. U. K.

Danzig.

Tre estimataj kaj karaj gekolegoj!

Du jaroj pasis de post XVII. U. K. en Genevo, kiam mi havis la feliĉon doni al ĉeestintaj malmultaj anoj de nia asocio la raporton pri la stato de IAEF dum la jaro 1924/25.

Estas por mi plezure post 2 jaroj denove vidi vin karaj gekolegoj, kaj denove doni al vi la raporton pri nia asocio. Permesu, ke mi antaŭ ĉio, transdonu al Vi salutojn de la estraranoj, kiuj ne povis veni ĉi tien. Same ankaŭ mi salutas vin, dezirante, ke vi forportu el tiu ĉi kunveno plej bonajn impresojn.

Spite de la malhelpoj, kiujn la estraro dum pasintaj 2 jaroj havis, mi povas konstati, ke la laboro de la estraro kaj progreso de la asocio estis kontentigaj.

Mi volas antaŭ ĉio akcenti, ke nia asocio estas tre malgranda, dume la postuloj, kiujn oni starigas sur ĝin, kaj speciale sur la estraron estas tre grandaj. Ni vidas, ke grandaj kaj gravaj esperantaj organizaĵoj kiel ekz. UEA travivas krizon tre danĝeran. La saman konstataĵon, mi devas ankaŭ fari pri nia asocio. Nia asocio estas spegulo en kiu respiguliĝas ĉio kio okazas antaŭ ĝi. Se en la mondo regas krizo ne povas en nia asocio esti grandaj progresoj kaj favoraj cirkonstancoj. La samo kion sentas UEA en pli granda, sentas ankaŭ ni en relative malpli granda amplekso.

Se ni komparas la hodiaŭan staton kun la stato antaŭ 3 jaroj, ni devas ĉiuj nur kun feliĉo kaj ĝojo rigardi la laboron faritan, la sukcesojn atingitajn dum la plej granda ekonomia kaj spirita krizo. La homaro, speciale en Eŭropo, travivas ambaŭ krizojn. Ili ambaŭ estas sekvoj de la milito. Dum milito malriĉiĝis ne nur unuopuloj, sed ankaŭ grandaj ŝtatoj. Multaj bankrotis! Multaj riĉiĝis! Ekregis epoko kies karakterizo estas monavido, materialismo, ignorado de ĉiu kultura laboro kaj postkurado post la mono kaj speciale manko de idealismo. En tiaj cirkonstancoj malfacila estas ĉiu laboro, ĉiu progreso sur ideala kaj kultura kampo.

Grava malhelpo al forta evoluo de nia movado inter la fervojistoj en preskaŭ ĉiuj landoj estas malaltaj salajroj de la fervojistoj. En kelkaj landoj tiu stato estas tre terura. Fervojistoj apenaŭ trovas la monon necesan por vivi. Ĉu en tiaj cirkonstancoj nia asocio povas per grandegaj paŝoj progresi? Ne! Kiam ĉiu sin okupas pri la aferoj bezonaj por vivteni sin kaj sian familion nia laboro ne povas esti tre fruktodona. Antikvaj Romanoj diris ke dum milito silentas la muzoj. Ni vidas, ke ankaŭ post milito ili silentas, ĉar la homoj sin ne okupas pri idealaj aferoj kiam ilia stomako grumblas.

Sed estas konstatebla certa pliboniĝo en tiu rilato. La homaro retrovas vojon al idealoj. Kiam ĉesas zorgoj pri vivteno aperas denove intereso por kulturo.

Kun la pliboniĝo de vivkondiĉoj ankaŭ nia asocio pliboniĝos kaj pli forte progresos.

Ni vidu nun detale, kiel staras nia asocio.

Antaŭ 3 jaroj ni havis 2 fervojistajn asociojn. La tempo estis malfacila. Ni devis penegi por teni ekvilibron kaj batali por povi fine venki. Mi devas

danki al konsciaj samideanoj, kiuj nin en nia malfacila batalo subtenis kaj helpis al ni venki. Mi esperas, ke neniu bedaŭras pro la subteno tiutempe donita al ni.

La laboro dum pasintaj 3 jaroj estis ĉefe dediĉita al organizado. Organizo estas treege grava, se oni intencas havi firman fundamenton por plua konstruado de la asocio.

Dum XVII. U. K. en Geneve (antaŭ du jaroj) estis akceptitaj novaj statutoj en kiuj estas esprimita organizadmaniero de nia asocio. Kun ĝojo mi konstatas, ke la statutoj estas bonaj. Montrigis, ke tiuj, kiuj laboris laŭ la intencoj esprimitaj en la statutoj bone sukcesis.

Nuntempe estas konata nur nia asocio kiel sola fervojista esp. asocio. Tiu fakto estas unua pozitiva sukceso de nia laboro. Ni profitu el tio kaj lernu, ke oni per komunaj fortoj povas atingi pli ol per fortoj disigitaj.

La dua pozitiva sukceso de nia laboro estas subteno flanke de naciaj fakaj revuoj. Antaŭ 5 jaroj nur de temp' al tempo aperigadis naciaj fakaj revuoj artikolojn pri kaj por Esperanto. Hodiaŭ, ni kun ĝojo konstatas, ke pluraj naciaj fakaj revuoj preskaŭ konstante tre volonte presigas regule la artikolojn. Mi mencias jenajn:

»Signalen« organon de svedaj fervojistoj.

»Side« organon de estoniaj fervojistoj.

»Der Eisenbahner« »Le Cheminot« »Ferroviario« (organoj de svisaj ferv.) »Glasnik Udruženja Jugosl. Nac. Železničara i Brodara« (org. de sudsl. ferv.) Bulteno de I. T. F. el Amsterdam aperanta en 4 lingvoj. Krom tio aperas artikoloj ankaŭ en alilandaj revuoj ferv.

Ke el tia propagando sendube rezultos post iom da tempo bona sukceso estas pli ol certe. Oni devas nur daŭrigi tiun laboron, ĝis la semo elkrekos kaj donos fruktojn. — Nun estas pli facile ĉe la revuoj, kiuj ne ankoraŭ konsentis presigi la artikolojn, klopodi, ke ankaŭ ili simile al la cititaj presigu pri- kaj por- Esperantajn artikolojn.

La tria grava sukceso, estas la establigo de la oficejo IAEF. Kion enhavas la oficejo vi vidos el alia raporto. Ĉi tie mi volas akcenti, ke unu sola homo, malavara, komprenema, ebligis la instalon. Tiu estas nia ŝatata ano kaj asesoro sro Ernst Eriksson. Lia donaco, lia subteno, donis al ni novajn fortojn por pli efika laboro. Mi konfesas malkaŝe, ke la situacio sen oficejo estus terura por ni. La progreso de nia asocio estas grandparte lia merito kaj mi en la nomo de la estraro esprimas al sro Eriksson ankaŭ ĉi tie nian plej koran dankon. La historio sendube ne forgesos citi lian noblan agon sur siaj paĝoj. Hodiaŭ dank' al sro Eriksson ni havas modele aranĝitan oficejon, kiu, almenaŭ nuntempe, respondas plene al niaj bezonoj, kaj en kiu oni havas ĉiun necesan ilon por labori.

La kvara grava sukceso de nia movado estas la reputacio, kiun ĝuas nia asocio ĉe la plej gravaj faktoroj de esperanta movado. Antaŭ kelkaj jaroj oni eĉ ne konsideris serioze nian fervojistan movadon. Hodiaŭ ni povas ĉiuj esti fieraj, ke plej superaj institucioj sin turnas al ni kiam temas pri fervojaj aferoj, rilatas kun niaj asesoroj antaŭ ol entrepreni ion en fevoja sfero. Niaj asesoroj estas konsiderataj kiel seriozaj homoj kaj esperantistoj, je kies helpo oni povas kalkuli.

Ĉi tie mi rememorigas Vin pri la sukceso ĉe sudslavaj fervojoj, kiu estis frukto de longdaŭra kunlaborado inter nia asocio kaj Internacia Centra Komitato. Same mi memorigas pri la cirkulero dissendita flanke de nia estraro kaj rekomendita de I. C. K. al ĉiuj naciaj societoj por subteno de niaj asesoroj.

Konstatinte ĉion ĉi diritan, mi volas al vi karaj, samideanoj doni raporton pri la laboro de unuopaj estraranoj.

Nia prezidanto sro Stojnić, malgraŭ sia grandega laboro en fervoja oficejo, montris dum tiu ĉi jaro eksterordinaran laboremon. Dum la lasta jaro li ekspedis 363 korespondaĵoj. Plej granda parto de ili estis korespondaĵoj kun ICK kaj viceprezidanto. Krome sro prezidanto helpis multege por atingi la jam al Vi konatan sukceson ĉe sudsl. fervojo. Mi povas diri, ke neniu de ni, nunaj estraranoj, esperis, ke sro Stojnić povos spite de sia okupo tiom labori.

La viceprezidanto. Mi ekspedis dum la asocia jaro 1925/6 681 korespondaĵojn, kaj dum 1926/7 415 korespondaĵoj. Krome mi gvidis tutan asocian laboron krom la kasista. Okupis min ĉiuj problemoj ril, nian organizon. Eĉ ne unu korespondaĵo estis farita sen mi. Mi akcentas, ke akcesoraĵoj, laboroj simplaj, kiuj povas esti plenumataj de iu ajn, devas esti plenumataj de mi kaj tio forprenas al mi terure multe da tempo utiligebla por aliaj laboroj.

La sekretario. En tiu ĉi rilato mi devas bedaŭrinde prezenti malfavoran raporton. Dum 3 jaroj ni devis ŝanĝi 3 sekretariojn. Mi akcentas, ke sekretario, kiu volus sin dediĉi plene al asocia laboro estus grava helpo por ni. Restus al mi sufiĉe da tempo por redaktado de la gazeto. Ĉiuj ĝisnunaj sekretarioj komence entuziasmiĝis, sed la entuziasmo perdiĝis, kiam ili vidis, ke oni devas multe labori kaj krom tio, sen ia pago. Iom post iom ili lasis la funkcion kaj laboris ion alian, kio prezentis por ili aŭ pli da plezuro aŭ pli da utilo.

Kasisto. Ni havis ankaŭ tie ŝanĝon. Sro Slaviček, kiu preskaŭ 2 plenajn jarojn administris la kason, estis malhelpita per sia privata laboro, kaj devis rezigni je funkcio. Ni elektis kiel kasiston sron Mužinić, kiu ankaŭ estas tre okupita, sed tamen almenaŭ povas fari plej necesajn laborojn.

La asesoroj. Mi donos ĉi tie klarigon ankaŭ pri niaj diverslandaj asesoroj.

Anglujo. Malgraŭ multaj klopodoj kaj provoj ni malsukcesis ricevi tie bonan, indan, reprezentanton. La eksasesoro sro Hodges ne skribis al ni de post 28. VI. 1925, do antaŭ preskaŭ plenaj du jaroj.

(Daŭrigota.)

Hungarujo. Fondo de hungara ferv. esp. grupo.

»Hungara Esperanta Societo« je mia iniciato dissendis cirkuleron al la fervojistaro por fondi apartan fak-grupon. Ni kunvenis la 4-an de Aprilo t. j. en »Magyar államvasutasok Irodakezelők Köre«, kie ni fakte fondis la fak-grupon, sub egido de »HES«. La kotizo estas 10 pengöj jare. Ĉiu ano ricevas la »Verdan Stelon«, kiu enhavas la oficialan sciigon de »HES« kaj »La Fervojiston«.

Emil Löbl, asesoro de IAEF.
Budapest-Hungarujo.

Francujo. Ni havas la plezuron konigi al la legantoj, ke grupo de nia asocio ĵus fondiĝis en Strasburgo (ĉefurbo de la franca provinco Alzaco).

La grupo, kies prezidanto estas nia samideano Hammenn, konsistas ĝis nun el 8 fervojistoj. La kunvenoj okazas ĉiun vendredon je la 20-a h. en la »Taverne des Sports, Grand Rue«.

Ch. Kanmacher, sekr. de la grupo
kaj asesoro de IAEF. por Francujo.

SCIIGOJ DE LA ESTRARO

Laŭ la decido de la estraro, estas al ĉiuj anoj ekspedita tiu ĉi numero de la revuo. La dua numero estos ekspedita nur al tiuj, kiuj pagos la kotizon, ĉu la tutan, ĉu la parton. La kotizo por tiu ĉi jaro restas — laŭ decido de la jarkunveno — la sama kiel en pasinta asocia jaro.

Al tiu ĉi numero ni tiucele aldonas la presajon, kiun bonvolu ĉiu ano plenigi kaj kune kun la kotizo sendi al ni, ĉar ĝi servas kiel enspezdokumento por la kaso. La anoj el Jugoslavujo bonvolu uzi la aldonitan poŝtĉekon. Tiuj anoj, kiuj eventuale ne povus tuj pagi la kotizon, kaj promesas tion fari poste, bonvolu nin informi pri tio, ĉar alimaniere ni ne plu sendos al ili la revuon. Ankaŭ poste estos malfacile ricevi la revuon, ĉar ni presigos nur tiom da ekzempleroj, kiom ni bezonos.

La kotizo estu sendata nur je la adreso de viceprezidanto, aŭ je la adreso de: Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj, Zagreb, Strojarska cesta, Jugoslavujo.

La estraro.

Kotizoj! Ĉiu ano paginta la kotizon ricevas monate oficialan organon „LA FERVOJISTO“. Okaze de aliĝo ricevas la ano legitimacion, statutojn, kaj ĉiujn ev. oficialajn eldonaĵojn de la asocio. — La kotizoj estas jene fiksitaj: Ĉeĥoslovakujo 20 ĉk; Danujo 4 kr; Germanujo 3 Rm; Hungarujo 5 pengö; Jugoslavujo 40 Din; Nederlando 2 G; Svedujo 4 Kr; Svislando 4 sv. fr; Usono 1 Dolaro. Abono estas la sama kiel la kotizo. Landoj, kiuj ne estas indikitaj pagas egalvaloron de 4 sv. fr. La kotizo estu sendata je la adreso: Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj, Zagreb, Strojarska cesta, Jugoslavujo. Jugoslavaj anoj sendu la kotizon per poŝtĉeko nro 35908.

Responda redaktoro: Ilja F. Puhalo, Zagreb, Strojarska cesta, želj. paviljon II, 24 Por la presejo respondas: Dro Janko Hörer, Zagreb, Prilaz Đure Deželića 2. Presejo: Zaklada Tiskare Narodnih Novina u Zagrebu, Frankopanska ul. 26.